# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

---

LOKA GRUPO DE ĈEA n-ro 2/1986 aprilo 1986

Jindřich Ondráček: N i a v e s t a ĵ o

(Daŭrigo el la pasinta n-ro)

Ni volas transiri pli al helaj, puraj, agrablaj koloroj. Nuna tekniko ebligas produkti materialojn kaj kolorojn, kiuj respondas al niaj bezonoj kaj postuloj.

Nin ĝojigas la movado. Ne plu ni estas amelitaj, seriozaj. Nun ni kondutas pli libere, senafekte. Ne plu ni iras posttagmeze kun la bastono kaj ĉapelo promeni. Nia vestaĵo devas konveni al niaj bezono kaj movigo. Pro tio viroj bezonas novajn fazonojn por la vestaĵo, pro pli libera movo de brakoj kaj gamboj.

Jen ni scias, kion ni bezonas. Kiam ni tiujn ĉi bezonojn atingas?

Ĉu vi jam scias, kion vi morgaŭ surmetos?

Jen kelkaj vortoj pri la ŝuoj. Ĉiuj infanoj naskiĝas kun sanaj piedoj. Dum la kontrolo de mil plenkreskuloj apenaŭ oni trovas iun kun sanaj piedoj. La kaŭzo? Malbona piedvesto. Estas necese aĉeti ŝuojn tiajn, kiuj havas formon de la piedo kaj ne, ke la piedo adaptiĝu al la formo de la ŝuoj.

Sian signifon havas ankaŭ la kalkanumo. Por la malmola ŝtona trotuaro ni bezonas ankaŭ malmolan plandumon. Se la ŝuo havas malmolan plandumon, poste sen kalkanumo ni malfacile povas piediri. La kalkanumo devas havi duoblan altecon de la plandumo.

Nadlaj kalkanumoj estas eltrovaĵo de baroko kaj rokoko. Tiel la homoj aspektas pli altaj kaj la tibikarnaj muskoloj distingiĝas. Sed la altaj kalkanumoj ankaŭ ŝanĝas la pozicion de artikoj kaj de tie estiĝas multaj malsanoj. La kuracistoj ne estas kontraŭ tio, se junaj virinoj uzas ŝuojn kun altaj kalkanumoj unu- aŭ dufoje dum semajno por kelkaj horoj. Sed tre danĝera estas ĉiam uzi tian "torturilon". Belaj sportŝuoj aspektas same bone kaj defendas nin antaŭ la malsanoj.

(Fino)

---

Jako každoročně, i letos se zúčastníme prvomájové manifestace. Zveme proto všechny členy a příznivce, aby přišli i se svými rodinnými příslušníky 1. května ráno posílit naše řady pod zeleným praporem a tabulí s názvem našeho klubu. Nezapomeňte: 1. května ráno před hlavní tribunou na Letenské pláni! Zve výbor klubu.

---

La Fervojista Sekcio de ĈEA invitas vin partopreni en la

A p r i l a internacia a m u z v e s p e r o

okazonta la 12-an de aprilo 1986 je la 18-a horo en la Klubo de Tesla Strašnice, strato Čáslavská, Praha 3 - Vinohrady (proksime de la metroo-stacio Flora). Refreŝigo kaj riĉa tombolo preparotaj. Muzikos Barbuloj. Enirpago 15,- Kčs.

Viajn ĉiutagajn zorgojn lasu hejme, vian bonhumoron kunportu! Interesiĝantoj_pri partopreno kaj eventuala tranoktado antaŭe anoncu sin al la adreso de la sekretariino de FS: Marta Křenková, Kyselova 1185/26, 182 00 Praha 8.

Japana eksperimento při robotizo

# M A G A Z E N O   D E   L A   J A R O   2 0 0 0

Vespere, tuj kiam post la lasta kliento fermiĝas pordo kaj la magazeno en Nokendai, la senfina industria antaŭurbo inter Tokio kaj Jokohamo, eksilentas, estigas tie vere stranga nokta tumulto. En stratetoj, forlasitaj de homoj, flagretas tien kaj reen robotoj, kiuj disveturigas varon. Ili moviĝas aŭtomate, direktitaj per kontaktiloj en la planko. Ĉe ĉiu fako ili restigas konteneron kun varo per kiu vendistoj matene nur kompletigos bretaron. Tiutempe la robotoj-provizistoj "ripozos" – ŝargos siajn bateriojn.

Malantaŭ la scenejo de tiu ĉi unua aŭtomatizita magazeno en Japanio, kiun liveris la kompanio Seibu en la jaro 1983, okazas, kiel skribas la franca gazeto Le Point, scenoj kvazaŭ el scienc-fikciaĵoj. Kamionojn sur la kajo malplenigas la robotoj-distribuistoj. Per siaj okuloj ili "legas" la glumarkojn sur kestoj (por ilin laŭ instrukcioj disveturigi al ĝustaj lokoj en la sesetaĝa aŭtomatizita deponejo. Dum sep minutoj unusola roboto malplenigas tutan kamionon, kion devus fari kvar homoj la tutan horon. Laboron de ĉi robotoj gardas unusola homo, kiu en la memoron de komputilo enmetas indikojn pri la varo kaj ĝia depono.

En la magazeno roboto anstataŭis eĉ vendiston en la fumaĵitaĵsekcio. Kliento enprogramigas sur la klavaro sian mendon – kvaliton, la nombron de ŝinkotranĉaĵoj (en Japanio, same kiel en vico de aliaj landoj, kliento mendas nombron da trancaĵoj) kun indiko de iliaj dikecoj. Antaŭ ol la roboto entranĉas, ĝi elkalkulas la prezon, konigante ĝin sur ekrano. Ĉu kara? Se jes, sufiĉas ekfunkciigi la premilon "nuligo".

"Fine vendisto, kiu ne trompas" – komentas Le Point, alte taksante la higienon de vendado.

Iom pli malproksime, en la fako, kiu per sia bretaro unuavide ne diferencas de aliaj, io de ie ekparolas, se oni etendas la manon por preni konservaĵon aŭ lavpulvoron. Tie temas pri infraruĝa radio, kiu registras la movon de mano al varo kaj ekfunkciigas magnetogofonon, kiu atentigas klienton pri tiuj aŭ aliaj avantaĝoj de la produkto, diktas recepton aŭ raportas, pri la konsisto de la produkto tiel, ke la kliento ne devas la konservaĵon eĉ kvinfoje renversi en la mano por trovi la indikojn por li interesajn. En plua fako roboto-veturileto enŝteliĝas en klientan favoron per rabatita varo ...

Fantoma magazeno, skribas Le Point, ĉiutage ĝin vizitas dumil klientoj, kiujn priservas nur 23 dungitoj, ja ceteron prizorgas la robotoj. La dungitoj kompreneble timas, ke en tiu ĉi laboratorio de la jaro 2000 plua evoluo de la robeti-zado ilin senlaborigos. Tial oni pere de sindikatoj postulis, ke la labordonanto donu al ili garantiojn, ke la robotoj faros nur pezajn, lacigajn laborojn kaj la vendistoj povos sin dediĉi al kontentigo de klientaj postuloj.

Kiel ajn estas ĉi prototipo de magazeno vizitkarto de la 21-a jarcento, jam nun ĝin supozas la kompanio Seibu superita kaj tiel, okaze de la Monda Ekspozicio TEEXPO en Cukubo, malfermis en ĝia najbareco pluan, ankoraŭ pli robotizitan magazenon. En tiu, inter alie, malaperas eĉ la tradicia vidindaĵo el memservejoj de la tuta mondo – kliento, puŝanta antaŭ si veturileton kun aĉetaĵoj. Nome ĉi tie oni instalis roboton-portiston. Ĝi unue prezentas sin: "Bonan tagon, mi nomiĝas Oki kaj estas je via dispono" kaj poste gvidata per ultrasona elsendilo, kiun la kliento alfiksas sur zonon, la klienton obee sekvas. Oni pensas eĉ pri la danĝero de ebla karambolo de unu roboto kun alia aŭ kun kliento – la roboto estas ekipita per instalaĵo, kiu ĉe minimuma kontakto kun fremda objekto haltigas la veturileton en daŭro de dekonsekundo. Kaj se Oki tamen ekpuŝas homon, ĝi montriĝas bone edukita roboto, dirante: "Oki vin ĝentile pardonpetas".

Kaj kion la homo en ĉio ĉi? Ŝajnas, ke en tiu ĉi reĝolando de robotoj kaj malgraŭ ilia perfekteco, li malaperas. Tamen kaj ĝentilaj robotoj kaj parolanta bretaro impresas iom senhomece, malvarme. Mankas tiu neanstataŭebla homeca kontakto, la eblo diri kelkajn frazojn. Sed eble tio estas nur afero de kutimo. Al la jaro 2000 restas tamen ankoraŭ dek kvin jaroj — kaj kiu scias....

(Laŭ Rudé právo esperantigis H. Štruncová)

František Gellner

## K u d r i s t i n o

Somera aero ekstere odoris impete.
Ĉe malfermita fenestro estis ĝi kiel vino.
Lacege metis la manojn sindone ampete
malgranda, malgrasa kudristino.

En malplenon antaŭ si rigardis aŭdante
eternan, internan kantmelodion,
kiun sur kordoj koraj eltiris tremante,
serĉante por sia animo belegan ion.

Kaj kudristino silenta flustretis vere:
"La barilo eble nun kontraŭstaras
kunvenon homan eĉ nur po ere
kaj tiam mil vivoj vegetas kaj barojn faras."

Tradukis S. Zedníkova

## P a c e m a   B e r t a

Tiel oni nomis grafinon Kinská, la plej popularan virinon el la tuta Eŭropo dum la renkontiĝo de la pasinta kaj nuna jarcentoj. Ŝi naskigis en 1843 j. en Prago. Ŝi ne akceptis la kutimajn vivomorojn ŝiatempajn kaj pri sia sorto ŝi decidadis mem.

Vojaĝante tra la tuta Eŭropo ŝi eĉ partoprenis la fondiĝon de Nobelpremio pri la paco. Ŝi interrilatis kun reĝoj, diplomatoj, politikestroj kaj organizis pacajn societojn. En gazetaro ŝi atakis eĉ Bismark.

Dum sia restado en Parizo ŝi konatiĝis kun Alfred Nobel kaj la amikaj interrilatoj kun li daŭris la tutan vivon. Edziniĝinta Suttner ŝi komencis sian verkadon en Kaŭkazo, kie ŝi vivis kun sia edzo ok jarojn. Ŝia verko "For la batalilojn" ege sukcesis kaj estis tradukita en multajn lingvojn (ankaŭ en Esperanton fare de Caumont). Ŝi dediĉis la tutan vivon al la porpaca laboro kaj disvastigadis la sloganon, ke ĉiu racie pensanta homo povas partopreni la batalon por pli bonaj morgaŭoj. Ŝia korespondaĵo kun Alfred Nobel pruvas, kiel ili ambaŭ klopodis por fondi la pacpremion. Ili malamis la militon, sed ĉiu klopodis ĝin malhelpi alimaniere. Berta Kinská-Suttner kredis la socian evoluon kaj antaŭ ĉio tion, ke la homaron oni povas konvinki. Dume Nobel penadis elpensi batalilojn, kiuj pluajn militojn por ĉiam malebligus.

Nobelpremion pri paco Berta Kinská-Suttner tamen ĝisvivis kaj en la jaro 1905 ŝi fariĝis ĝia pertanto. Ŝi mortis en junio 1914 kaj la sorto indulgis ŝin – ŝi ne ĝisatendis la eksplodon de la unua moridmilito.

(Laŭ Večerní Praha tradukis H. Š.)

Noto: La grafino Kinská-Suttner onidire estis esperantistino.

## M e m o r t a b u l o   p r i   J o y   A d a m s o n

Omaĝe al la neĝisvivita 75-a naskiĝdatreveno de la mondkonata protektantino de la afrika naturo, Joy Adamson, senvualigis Ĉeha Asocio de Naturprotektantoj la menortabulon, instalitan sur ŝia naskiĝdomo en la urbo Opava, strato Na rybníčku 48. Joy Adamson, laborinte kun rabobestoj, scipovis ilin sensovaĝigi kaj poste revenigi al libera vivo en naturo. Antaŭ kvin jaroj murdis ŝin ŝtelĉasisto de rabaj bestoj. Ŝian cindron oni disŝutetis super la nacia parko Meru en Kenjo.

H. Š.

Zájemci o jarní esperantský seminář v Mnichově Hradišti, pořádaný pro omezený počet začátečníků ve dnech 25. - 27. 4. 1986, si mohou vyžádat přihlášku na adrese: Esperantský klub, 295 01 Mnichovo Hradiště.

Vážení samideáni!

Výroční členská schůze podpořila a do plánu činnosti dala návrh pořádat sobotní výlety.

Vedle pasivní četby, poslechu rozhlasů a referátů na pondělních schůzkách, vedle soukromého dopisování (to vše vsedě!), by tak zájemcům byla také dána možnost

1/ rozmluvit se, aktivně konverzovat za pochodu na zdravějším vzduchu,

2/ seznámit se s mimopražskými samideány a kluby (jen každý 23. člen ČES je Pražákem),

3/ seznámit své zahraniční hosty s méně známými pozoruhodnostmi naší vlasti,

4/ popularizovat esperanto mezi členy klubů, které by se spolupodílely na programu těchto výletů (Klub historické turistiky, Jonášové z Fonoklubu, příznivci jógy, Klub přátel výtvarného umění),

5/ založením turistické sekce – na podzim – oživit stagnující svazovou činnost která v současné době zaostává za činností na Slovensku i v sousedních zemích, o Bulharsku nemluvě.

První výlet bude mimořádně v neděli 6. dubna (sobota je pracovní). Sejdeme se v Libechově (turistická mapa Čes. Středohoří) u autobusu, který odjíždí z Fučíkovy v 8 hod. (nástupiště l). Těšíme se tedy na samideány z Mělnická, na roudnické KHT připomene – částečně v esperantu – 160. výročí narození V. Náprstka, příznivce českých turistů a cestovatelů. (V Liběchově je pobočka jeho muzea.) Nadýcháme se chráněného vzduchu krajinné oblasti Kokořínsko, podíváme se na sochy kuchtíka V. Levého a k Pantheonu, který v Tupadlech stál dříve, než ho před 95 lety otevřeli na Václavském náměstí. Překročíme Labe a domů se vrátíme vlakem.

Uvítáme všechny další příspěvky a náměty.

Chystáme výlety do Miletína (175. nar. K. J. Erbena), do Hostinného (145. nar. K. Klíče, antické uměni), na bojiště u Sadové (120. výročí prusko-rakouské války, šance pro setkání s esperantisty z okolních míst), k Máchovu jezeru (150. výročí vydání Máje) apod.

Informace na pondělních klubových schůzkách i v bultenu podá a na shledanou na srazech se těší s-aro Petro Š a r š e .

El la vivo de nia klubo

## Kiu venis - festenis

Riĉe ornamita arbeto, kvazaŭ arĝenta, sub la branĉetoj amaso da donacetoj. Mallaŭte aŭdiĝas kristnaskaj kantoj per ie kaŝita magnetofono. Sur la tabloj abundas plej malsamaj frandaĵoj, bombonoj, kuketoj – ja bakis ilin diversaj samideaninoj. Frunte tronas la grandioza tomto, beligita per ruĝaj kaj flavaj rozoj kun verdaj folietoj kaj meze imagu! kvar Esperantaj steloj, ĉio manĝebla kaj bongusta.

Ne mankas vino kaj bona humoro. Du knabinetoj, kantantaj Esperante, ricevas grandan aplaŭdon kaj ili malavare ripetas sian programeron. La kantado de plenkreskuloj malpli sukcesas, tamen oni ne malkuraĝas. Kaj oni rakontas pri pli fruaj tempoj, pri eksterordinaraj travivaĵoj, simile kiel en la hejmoj iam, kiam ankoraŭ ne anstataŭis la familiajn interrilatojn la televido. Estis ĝoje, solene, aminde, memorinde, ni nur esperu, ke la fotoj estos bonaj kaj fariĝos daŭra rememoraĵo – je io bela, sukcesplena, malofta.

P. S. Mi ne rakontis pri mia sonĝo, sed pri reala Kristnaska Vespero de E-Klubo Praha, okazinta la 23-an de decembro 1985.

H. Š.

## Kio estis pli ĉarma?

La 3-an de marto aspektis ĉarme nia klubejo en Vejvodova strato. Ĉi-foje ni renkontiĝis tie kun virinoj, kiuj solenis la Internacian Virinan Tagon. La tabloj estis kovritaj per belaj tablotukoj, sur kiuj estis preparitaj diversaj bongustaĵoj kaj trinkaĵoj. Ĉar estis inter ni kelkaj eksterlandanoj, oni fakte parolis Esperante. Viroj gratulis la virinojn afable kaj ame. Domaĝe, ke la ejo estas tiel malgranda. Eble ni iam gajnos eblecon soleni la virinan tagon pli grandskale. Tamen la vespero estis ĉarma.

L. Kynčl